



Svisa Esperanto-Societo

informas

jaro 2005, numero 4-a: oktobro
kun informoj pri renkontoj ekde la 15-a de oktobro




Foto Anke Brouwer

Jen 18 „Ursoj“ de la Lernejo *La Grande Ourse* (La Chaux-de-Fonds) kun 12 „Kanguruoj“ de la Montessori-Lernejo *Treetops* (Perth en Aŭstralio) dum sia komuna restado en Montoz (Berna Ĵuraso), septembro 2005. En la venonta numero 2005-5 de *SES informas* aperos raporto pri tiu grava interlern-eja renkonto peresperanta.

Rememorigilo

SES informas

Redakcio:

Claude Gacond, Poŝtfako 3034,
CDELI, Biblioteko de la Urbo,
2303 La Chaux-de-Fonds.

Retpoŝto: claude.gacond@ne.ch

Tel.: ĉe CDELI: 032 967 68 55,
hejme: 032 926 52 32

Fakso: ĉe CDELI: 032 967 68 29:
indiki: por Claude Gacond

Redaktaj kunlaborantoj:

Rolf Ernst, Nancy Fontannaz, Andy
Künzli, Richard Schneller.

SES informas

Redaktaj datlimoj

2005-5: novembro-decembro: oktobre
15. Mencio de informoj ekde la 15-a de novembro.

2006-1: januaro-februaro : decembre 15.
Mencio de informoj ekde la 15-a de januaro.

2006-2 : marto-majo : februare 15.
Mencio de informoj ekde la 15-a de marto.

2006-3 : junio-aŭgusto : maje 15. Mencio
de informoj ekde la 15-a de junio.

2006-4 : septembro-oktobro : aŭguste
15. Mencio de informoj ekde la 15-a de septembro.

SES-estraro

Bruno Graf, prezidanto, Jurastrasse 23,
3063 Ittigen/Bern. Tel.: 031 921 44 59.
Retpoŝto: bgraf.o@bluewin.ch

Dietrich Weidmann, vicprezidanto,
PF 301, 8034 Zürich. Tel.: 044 251 50 25.
Retpoŝto: info@esperanto.ch

Mireille Grosjean, vic-prezidanto, Grand-
Rue 9, 2416 Les Brenets. Tel.: 032 932 18
88. Retpoŝto: mireille.grosjean@rpn.ch

Nicole Margot, sekretario, Chemin des Lys
4, 1010 Lausanne. Tel.: 021 653 14 67.
Retpoŝto: n.margot@bluewin.ch

Hans-Werner Grossmann, kasisto,
Esperanto-Servo, PF 262, 4132 Muttensz 1.
Tel.: 076 460 8992. Retpoŝto: esperanto-servo@bluewin.ch

Poŝta ĉekokonto

17-581908-4

Svisa Esperanto-Societo 2300 La Chaux-de-Fonds

Kotizoj al SES

kun ricevado de *SES informas*.

fr. 10	Infanoj	ĝis 18 jaroj
fr. 20	Junuloj	de 19 ĝis 29 jaroj
fr. 35	Plenkreskuloj	ekde 30 jaroj
fr. 50	Paroj	"
fr. 70	Patronoj	"
fr. 25	nura abono al	<i>SES informas</i>



Svisa kalendaro

Oktobre

- 15 : Lausanne: Regiona tago de SES.
- 15: Redakta datlimo de SES informas.
- 27: Basel: ESB: Ĉiu rakontas pri siaj ferioj.
- 29-30: La Chaux-de-Fonds: KCE, Monatfino.
- 29-1 nov.: Chaux-de-Fonds: KCE: E-o-kurso.

Novembre

- 1 : Genève : Kun Claude Gacond pri H. Hodler
- 2: Luzern: LES: Konversacia rondo.
- 5: Chaux-de-Fonds: CDELI: Kultura seminario.
- 7: Lausanne: LES: Kunveno.
- 9: Chaux-de-Fonds: Neŭŝatela grup-vespero.
- 15: Redakta datlimo de SES informas.
- 19: Chaux-de-Fonds: CDELI: Didaktika sabato.
- 23: Chaux-de-Fonds: Neŭŝatela grup-vespero.
- 24: Basel: ESB: Programo 2006.
- 26-27: La Chaux-de-Fonds: KCE, Monatfino.

Decembre

- 3: Chaux-de-Fonds: CDELI: Kultura seminario.
- 6: Genève: Monata kunveno.
- 7: Luzern: LES: Zamenhof kaj programo 2006.
- 10: Basel: ESB: Zamenhofa festo, ESB 100-jara.
- 11 : Lausanne : Zamenhofa Festo.
- 14: Chaux-de-Fonds: Neŭŝatela zamenhofa festo.
- 15: Redakta datlimo de SES informas.

2006 Januare

- 4 : Luzern: Konversacia rondo.
- 11: Chaux-de-Fonds: Neŭŝatela grup-vespero.
- 21: Chaux-de-Fonds: CDELI: Didaktika sabato.
- 25: Chaux-de-Fonds: Neŭŝatela grup-vespero.

Februare

- 4: Chaux-de-Fonds: CDELI: Kultura seminario.
- 6 : Lausanne: Ĝenerala Asembleo.
- 8: Chaux-de-Fonds: Neŭŝatela grup-vespero.
- 15: Redakta datlimo de SES informas.
- 18: Chaux-de-Fonds: CDELI: Didaktika sabato.

Marte

- 4: Chaux-de-Fonds: CDELI: Kultura seminario.
- 8: Chaux-de-Fonds: Neŭŝatela grup-vespero.
- 18: Chaux-de-Fonds: CDELI: Didaktika sabato.
- 22: Chaux-de-Fonds: Neŭŝatela grup-vespero.

Aprile

- 1: Chaux-de-Fonds: CDELI: Kultura seminario.

Maje

- 6: Chaux-de-Fonds: Ĝenerala Kunveno de SES & 50-jara jubileo de CDELI.
- 6-7 : Chaux-de-Fonds : Kulura Semajnfino.
- 10: Chaux-de-Fonds: Neŭŝatela grup-vespero.
- 15: Redakta datlimo de SES informas.
- 20: Chaux-de-Fonds: CDELI: Didaktika sabato.

Junie

- 14: Chaux-de-Fonds: Neŭŝatela grup-vespero.
- 17: Chaux-de-Fonds: CDELI: Didaktika sabato.

Aŭguste

- 15: Redakta datlimo de SES informas.

-oOo-

Vivo de SES

Ripeto de la informo pri


Regiona Tago de SES en Romandio

Sabate la 15-an de oktobro 2005

Laŭzano

Picejo *Le Milan*, bulvaro Grancy, 54

La picejo *Le Milan* situas je la kruciĝo de la bulvaro Grancy kun la avenuo Fraise, sudokcidente de la stacidomo. Vi povas, ĉu eliri sude de la stacidomo kaj longiri okcidenten ĝis avenuo Fraise, kaj plu iri kelkajn metrojn suden, ĉu eliri norde de la stacidomo kaj piediri okcidenten ĝis avenuo Fraise (sub la fervojo) kaj malsupreniri ĝis bulvaro Grancy.



Programo

Matene:

- 10h Alveno, akcepto kaj kafumado, mendo de tagmanĝo, pago de la partopren-kotizo (CHF 10.-).

- 10h 30 Debato gvidata de Bruno Graf, prezidanto de SES: kiel prezenti esperanton dum la angla jam iĝis "lingua franca" (ĉies lingvo)? Post enkonduko,

diskutoj okazos en diversaj grupoj.

- 12h 30 **Tagmanĝo:** je alveno eblos mendi surloke italajn specialaĵojn laŭ diversaj prezoj.

Posttagmeze:

Temo: Ekologio

Unua preleganto: **Dro Manfred Westermayer**, kemiisto, prezidanto de la Asocio por Verduloj Esperantistaj, el Germanio.

- 14 h **Rilatoj inter esperantistoj kaj verduloj, aŭ kiel rilati kun politikaj partioj.***

- 15 h 30 **Agenda 21**, agadprogramo por la 21a jarcento, orientita al respektama disvolviĝo kaj adoptita de la ŝtatoj subskribintaj la Deklaracion de Rio de Janeiro en junio 1992.*

- 16h 30 paŭzo

Dua preleganto: **Alain Favre**.

- 17 h **Ĉu ekzistas prilingva ekologio?***

* La tri prelegoj estos sekvataj de diskutoj

Komuna vespermanĝo povos esti planita surloke kun interesatoj.

Dimanĉe la 16an de oktobro:

Al la partoprenantoj, kiuj dezirus daŭrigi sian restadon en Laŭzano dimanĉe, ni proponas turisman programon:

Vizito de la mezepoka vaŭda urbeto *Moudon* (norde de Laŭzano).

Vojaĝo per aŭtobuso: foriro el la bushaltejo Tunnel je la 10h 09, alveno en *Moudon* 10h 53. Promenado tra la urbeto, pikniko aŭ manĝo en restoracio, vizito de la historia muzeo kaj de la muzeo *Eugène Burnand*, vaŭda pentristo (1850-1921). Eventuala promenado en la apuda arbaro. Reveno: 18h 02 el *Moudon*, 18h 44 alveno en Laŭzano (aŭ laŭplaĉe, ekzistas busoj ĉiuhore dum la tago, kaj eĉ trajnoj).

Nur se la vetero ege malbonos, ni prefere vizitos laŭzanajn muzeojn.

Aliĝoj

Aliĝoj ĝis la 10-a de oktobro:

al Nicole Margot, ch. des Lys 4, CH-1010 Lausanne,

tel: 021 653.14.67, <n.margot@bluewin.ch>.

Via aliĝo necesas por taksi la nombron de partoprenantoj, sed la kotizon vi pagos surloke. Bonvolu mencii ĉu vi ankaŭ partoprenos la dimanĉan programon. La organizantoj ne zorgas pri rezervoj de hotelo.

Nicole Margot, antaŭĝoja renkonti vin.

-oOo-

Hillel la saĝulo, lia vivo, lia instruo kaj la zamenhofa hilelismo

Prelego de André Cherpillod

Ĉe CDELI en la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds

Strato Progrès 33, (de la stacidomo buslinio 4, direkto Hôpital, haltejo Bibliothèque)

sabaton 5-an de novembro

(Detalaj informoj troveblas ankaŭ en la rubriko CDELI)

Tiu seminaria renkonto organizita sub la aŭspicio de SES, ILEI kaj UEA disvolviĝos laŭ la ĉi-sekva horaro :

9 h 30: Malfermo de la CDELI-salono kun eblo aĉeti librojn kaj babili kafumante. La libro-stando prezentos ĉiujn nun aĉeteblajn verkojn de André Cherpillod. Profitu tiun ĉi okazon por pliriĉigi vian propran libroron.

10 h 30: Oficiala malfermo, konatiĝo kun la prelegonta verkisto André Cherpillod.

11 h 00: 1-a preleg-periodo.

11 h 45: paŭzo.

12 h 00: 2-a preleg-periodo.

12 h 45: Paŭzo por komuna tagmanĝo en najbara restoracio.

14 h 30: 3-a preleg-periodo.

15 h 15: teuma paŭzo.

15 h 30: 4-a preleg-periodo.

16 h 15: Oficiala konkludo.

16 h 30: Teumo, librovendo.

17 h 00: Oficiala fermo.

17 h 30: Fermo de la CDELI-salono.

(Pro la nunaj riparoj en la biblioteko povas esti, ke la kutima enirejo al CDELI ne estos alirebla. Tiam indikiloj kondukos vin al konvena provizora enirejo.)

Aliĝo: Ĉiu partoprenonto bonvolu nepre sin anonci kiel eble plej rapide al Claude Gacond, lastmomente ĝis la antaŭa vendredo 4-a de novembro :

ĉu skribe : Claude Gacond, CDELI, Biblioteko de la Urbo, CP 3024, 2303 La Chaux-de-Fonds,

ĉu rete: claude.gacond@ne.ch

ĉu telefone: CDELI: 032 967 68 55, (hejme 032 926 52 32).

Partoprenkotizo pagota surloke: Por minimuma kovro de la elspezoj la partoprenkotizo estas po Fr. 20.- por persono. Kiu ne antaŭanoncis sian partoprenon, tiu pagas pluse Fr 5.-.

Rememorige : Lejzer Zamenhof publikigis sian *Deklaracion de Hilelisto* ekzakte antaŭ 100 jaroj, inter la 1-a kaj la 2-a Universalaj Kongresoj de Esperanto okazintaj en Boulogne-sur-Mer en 1905 kaj Genève en 1906. Do nia renkonto disvolviĝos en jubilea etoso.

Venonta

Ĝenerala Kunveno de SES

Sabaton 6-an de majo 2006

La Chaux-de-Fonds

Ĉiuj nepre notu en sia kalendaro, ke la venonta Ĝenerala Kunveno de SES okazos je **la sabaton 6-a de majo 2006** en La Chaux-de-Fonds. Samtage estos festata la 50-jara jubileo de CDELI.

Sekvos semajnfina renkonto, kiu ebligos ne tuj reveturi hejmen je la fino de la sabata posttagmezo, sed ankaŭ travivi agrablan kulture varian vesperon kaj profiti pliintimiĝi kun la ĵurasa regiono la dimanĉon. Detalaj informoj aperos en la venonta numero 2005-5 de *SES informas*.

-oOo-

Donacoj

Donacoj en frankoj:

Al SES : Christophe Salis, Châtelaine, 15; Fritz Wassmann, Hinterkappelen : 5. Sume: 20.

Agado 2005:: Anonime: 100. Sume: 100.

Novaj patronoj 2005

(Tiu fariĝas patrono, kiu pagas duoblan jarkotizon.)

Anne-Marie Cramatte, Onex, Yvette Goy, Cully.

Nome de SES la kasisto Hans-Werner Grossmann dankas la registritajn donacintojn pro ties malavareco.

-oOo-

Tutsvisa aktiveco

CDELI

Centro de Dokumentado kaj
Esploro pri la Lingvo Internacia
Biblioteko de la Urbo

Progrès 33, CP 3034, 2303 La Chaux-de-Fonds. Tel. : 032 967 68 55.

Fakso : 032 967 68 29, indiki : por CDELI.

Retadreso : cdeli.vch@ne.ch

martine.schneller@ne.ch

claud.gacond@ne.ch

nancy.fontannaz@ne.ch

monika.molnar@ne.ch

Neordinare grava donaco

De s-ino Elisabeth Burri en Zumbikon (ZU) CDELI ricevis tre gravan kaj neordinaran donacon. Temas pri kolekto de 12 akvafortoj de ŝia onklo, la pentristo kaj esperantisto Alfred Gloor (1892-1978).

Tiu bernano frue forlasis Svislandon komence de la unua mondmilito post siaj studoj en Berno kaj Ĝenevo, por definitive instaliĝi en Parizo en 1915, kaj estas en tiu ĉi urbo, ke efektiviĝis lia metiista kaj artista karieroj.

Lia esperantismo arte esprimiĝis kun granda viglo kaj originaleco en la kreo de la 12 menciitaj akvafortoj. Kiel titolon de tiu gravura kolekto la artisto elektis la misfaman urbanomon « Kajeno ». Li celis kompren-

igi, kion simbolas Kajeno en tiu verko pere tiuj ĉi enkondukaj vortoj esperantlingvaj: « *Kajeno* » ne nur celas kulpigi militfarantojn, sed ĉefe la grandan paceman sed nescieman popolamason, kiu post ia ordono sin lasas ŝanĝi en « *mortigan vivantan maŝinon* » forlasante ĉian homan indicon. » Kaj ĝuste tiun ĉi mortigan maŝinon li prezentas al niaj okuloj. Liaj gravuraĵoj, kiuj datumas de 1924, ne nur rememorigas la buĉadojn de la tiam ĵus pasinta unua mondmilito, sed iel profetas la monstraĵojn baldaŭ reokazontajn pro la karambolo de la ŝovinismoj naciismaj.

Bona enkonduko al la rigardado de tiuj 12 dramplenaj bildoj povus esti deklamado el la verko *Interpopola Konduto* aŭ *Le Choc des patriotismes* de Edmond Privat, aŭ laŭtleĝo de homaranismaj tekstoj zamenhofaj.

Alfred Gloor esprimas sin arte kiel vera homarano kaj lia konkluda gravuraĵo titolita *La PACO* iel atentigas al la paciga rolo de esperanto.

Sed Alfred Gloor ne nur esprimis sian abomenon al la militaj agoj. Aliaj gravuraĵoj, kiujn CDELI provizore prunte ricevis, malkovrigas en li admiranton de pejzaĝoj, priskribanton de parizaj stratoj, imaganton de fea mondo. Kaj interese estas scii, ke al la familianoj restintaj en Berno li ne skribis germane, sed en la berna dialekto. Lia leteraro atestas, ke la

esperantismo de Alfred Gloor ankaŭ sin esprimis por la defendo de la lokaj lingvoj, kies ekziston minacas la naciaj lingvaj ŝovinismoj : avangarda etnisma sinteno.

Tre verŝajne la verkaro pentra kaj skriba de Alfred Gloor trovos rifuĝejon en CDELI kaj la ekspozicio festonta la 50-jaran jubileon de CDELI en majo 2006 donos la eblon renkontiĝi kun la personeco de Alfred Gloor tra specimenoj el liaj artaĵoj.

Didaktikaj stud-sabatoj

La didaktikaj stud-sabatoj rekomenciĝos laŭ tiu ĉi kalendaro :
novembre 19, 2006 januare 21,
februare 18, marte 18, majo 20,
junie 17. Ili okazas la 3-an sabaton de la monato helpe al ĉiuj esperantolernantoj : tutkomencantoj, komencantoj kaj progresantoj.

La sabata seminario

La sabaton 5-an de novembro komenciĝos la sabata seminario per prelego de André Cherpillod pri *Hillel la saĝulo, lia vivo, lia instruo, kaj pri la zamenhofa hilelismo*.

La celo de tiu seminario ne estas la studo de la lingvo mem, sed kleriĝo koncerne al la historio kaj al la literaturo de esperanto. Jen la datoj de tiu seminario okazanta principe la unuan sabaton de la monato en neferia periodo : novembre 5,

decembre 3, 2006 februare 4, marte 4, aprile 1.

Ambaŭ aranĝoj disvolviĝas ĉe CDELI en la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds laŭ la sama horaro :

Horaro

9 h 30: Malfermo de la CDELI-salono kun eblo aĉeti librojn kaj babili kafumante.

10 h 30: **Oficiala malfermo**, formiĝo de la studrondoj.

11 h 00: **1-a studperiodo**.

11 h 45: paŭzo.

12 h 00: **2-a studperiodo**.

12 h 45: Paŭzo por komuna tagmanĝo en najbara restoracio.

14 h 30: **3-a stud-periodo**.

15 h 15: teuma paŭzo.

15 h 30: **4-a stud-periodo**.

16 h 15: **Konkluda kunveno**.

16 h 30: Teumo, librovendo.

17 h 00: **Oficiala fermo**.

17 h 30: Fermo de la CDELI-salono.

Aliĝo: Por faciligi la organizon de la studaj kaj seminariaj sabatoj ĉiu bonvolu nepre antaŭanonci sian partoprenon al Claude Gacond almenaŭ ĝis la antaŭa vendredo :

ĉu skribe : Claude Gacond, CDELI, Biblioteko de la Urbo, CP 3024, 2303 La Chaux-de-Fonds,

ĉu rete: claudio.gacond@ne.ch

ĉu telefone: CDELI: 032 967 68 55, (hejme 032 926 52 32).

Partoprenkotizo: Por minimuma kovro de la elspezoj la partoprenkotizo estas po Fr. 15.- por partopreno en la stud-sabato (lernejano, studento, metilernanto senpage), kaj po Fr. 20.- por partopreno en la sabata seminario. Kiu ne antaŭanoncis sian partoprenon, tiu pagas pluse Fr 5.-.

-oOo-

KCE

Kultura Centro Esperantista
Strato Postiers 27, Poŝtfako 311
2301 La Chaux-de-Fonds
Tel. & Fakso : 032 926 74 07
kce.esperanto@bluewin.ch

Kulturaj Monatfinoj

La Kulturaj Monatfinoj ekas sabate je 15h30 kaj ĉesas dimanĉe je 12h30. Komuna distra programno sabate vespere.

Informas kce@esperantio.net

Oktobre 29-30 : Temo sub la gvido de fakulo pri internacia diplomatio : Unuiĝintaj Nacioj 60-jara organizo : ĉu eblas juniga reformo ? En la sama semajnfino ekas kurso por progresantoj (nivelo B1), kiu daŭros la 31-an kaj 1-an de novembro.

Novembre 26-27 : Fermo de la jubileo de la Fundamento per prelegaro pri « 1905 kaj la sekvo », kiun enkondukos s-ro Francisko Degoul. Oni neeviteble komparu 1905-an kaj 1906-an, precize se temas pri la koncepto de esperantismo » opinias la enkondukonto. « Ĝin difinis en 1905 la Bulonja Deklaracio, ekzegezita de Zamenhof en Ĝenevo, unu jaron poste. Sed ĝis kiu grado tiu ekzegezo koheras kun la Deklaracio ? »

Raporto

Dum du semajnoj la partoprenantoj, el 4 landoj, al la Esperantologia Fakultato konatiĝis kun la lingvo-

instruado tra la prelegaro de Duncan Charters (Usono). Pri la historio de esperanto kaj de ties literaturo, ĉefe pri la jaroj inter 1887-1905, lekciis Giorgio Silfer. Usui Hiroyuki (Japanio) lekciis pri la interkulturaj problemoj.

Dieter Rooke.

Literatura kaj feminisma kolokvo Esti virino kaj verkistino

La kunvenoj okazis dulingve (france kaj esperante) kun interpretado de Henry Bernard. Prelegis interalie Fawzia Assad pri la egipta situacio, Zeinab Diallo Koumanthio pri la nigra Afriko, Kristin Schnider pri aziaj respublikoj, precipe Kirgizio.


La asembleo de la Feminisma Esperanta Movado okazis la 14-an de aŭgusto en belega saloneto de Hotelo Athmos. Ĝi aprobis tri rezoluciproponojn, ĝisdatigis la membraron kaj bonvenigis du novajn aliĝojn.

La programon de la festivalo riĉigis du muzikaj vesperoj. Loretta Venturilli kaj Jean-Thierry von Büren kantis kun pian-akompano de Giusta Giuseppe. Marion Bélisle ravis la publikon violonĉele antaŭ recitalo de Anjo Amika.

Ekskursoj kondukis al la insulo Sankta Petro spure al Jean-Jacques Rousseau kaj la sekvan tagon al la Kastelo de Ferney, kie verkis Voltaire.

Dieter Rooke

-oOo-



Loka vivo

Averto : Por la **novembra-decembra** numero 2005-5 de *SES informas*, kiu dissendiĝos fine de oktobro la redakta datlimo estas jam je la 15-a de oktobro. Informantoj pri la loka vivo bonvolu tuj havigi siajn raportojn ĝis tiu dato al Claude Gacond, Poŝtfako 3034, CDELI, Biblioteko de la Urbo, 2303 La Chaux-de-Fonds. Retpoŝto : claude.gacond@ne.ch

Basel

Esperanto-Societo Basel

PF 103, 4005 Basel, Tel.: 0049 76 214 57 12

Kunvenoj : 20 h 00 en la kelo de la malantaŭa domo, Riehenring 129.

Kunvenoj

Oktobre 27 : Ĉiu rakontu pri siaj ferioj.

Novembre 24: Programo 2005.

Decembre 10: Zamenhofa festo kaj cent-jariĝo de ESB.

Ni invitas jam nun ĉiujn aliajn esperantistojn festi kun ni.

Provizora programo :

Ĉirkaŭ la 11h00 : Alveno kaj aperitivo.

Ĉirkaŭ la 12h00 : Simpla manĝo.

Ĉirkaŭ la 13h30 : Foriro al Bazela Kristnaska Foiro aŭ al

Historia Muzeo aŭ al Pupmuzeo.

Sekvo de la programo ĉe Barfsser Platz

Ĉirkaŭ la 16h00 : Kafumado.

Ĉirkaŭ la 17h00 : Muzikado kaj kantado kun s-ro Paul Scherrer.

Ĉirkaŭ la 17h30: Prelego de s-ro Andy Künzli pri la historio de la bazela grupo.

Ĉirkaŭ la 18h30 : Festa vespermanĝo.

Ĉirkaŭ la 20h00 : Koncerto de kantistino kaj pianisto kune, Aparta kanto komponita por la okazo de s-ro Kurt Schweizer.

Ĉirkaŭ la 21h00 : Oficiala fino.

Nicole Béroud-Focke.

-oOo-

Genève

Esperanto-Grupo „La Stelo“

Case postale 188, 1211 Genève 20

Espéranto-Infos : Tel. : 022 740 04 45

Monata kunveno ĉiun unuan mardon de la monato (krom julie kaj aŭguste) en la stacidomo de Cornavin, kajo 1, Salle des conférences 2, je la 20 h 00.

Kunvenoj

Novembre 1: Kun Claude Gacond pri Hector Hodler kaj la paco.

Decembre 6 : Temo decidota.

-oOo-

Lausanne

Laŭzana Esperanto-Societo

Case postale 389, 1009 PULLY

Tel: 021 729 58 02

<esperanto@isuisse.com>

<<http://www.esperanto.ch>>

Kunvenoj : Stacidomo, 1-a etaĝo, ĉiun unuan lundon de la monato je la 20 h 00.

Kunvenoj

15 : Regiona Tago de SES en la picejo *Le Milan* proksime de la stacidomo.

Novembre 7: Temo anoncota.

Decembre 11 : Zamenhofa Festo.

2006 januare 9: Temo anoncota.

Februare 6: Ĝenerala Asembleo.

-oOo-

Luzern

Lucerna Esperanto-Societo

Adligenstr. 1/49, 6020 Emmenbrücke

Tel.: 041 280 46 12.

Kunvenejo:

Hotelo Waldstätterhof, Zentralstrasse 4
(proksime de la stacidomo). Tel. 041 2 271 271.

Gesinjoroj Anna & Koni Rey, Heimatweg 4,
6003 Luzern. Tel.: 041 210 25 88.

Kunvenoj

Decembre 7: Ĉe ges-roj Rey: 14h00:.,
14h30: Zamenhofologio kaj programo
2006 kun Paul Scherer.

Raporto

El Lucerno ne estas grandiozaj novaĵoj por raportoj. LES pli kaj pli ŝrumpas. Estas kun granda bedaŭro, ke nia longjara laborema honora membro Franz Brügger ne plu povas veni al la kunvenoj. Pro dorsa malsaneco en la aĝo de 86,5 jaroj li devis ĉesi aktivi, sed esperanto por li restas same grava kiel ĝis nun; tion li mem diris. La LES-anoj esperas, ke Franz tamen povos ankoraŭ subteni nin per bonaj ideoj kaj konsiloj el sia hejmo. Ni sendas al li kaj al lia edzino Margrit koran dankon pro la granda laboro farita dum multaj jaroj kaj deziras bonfarton en la nova hejmo.

Sonja Brun, nome de Lucerna Esperanto-Societo.

-oOo-

Kantono de Neuchâtel

Esperanto-kursoj ĉe Université populaire en La Chaux-de-Fonds

La Ĉaudefona Popola
Universitato anoncis novajn
esperanto-kursojn, kiujn gvidos
Monika Molnar en la CDELI-
salono. Jen la datoj de la kurso 36
Espéranto 1: oktobre 19 kaj 26,
novembre 2, 8 kaj 16. Kaj jen la datoj
de la sekva progresiga kurso 37
Espéranto 2: novembre 23 kaj 30,
decembre 7, 14 kaj 21. Ĉiuj diskonigu
tiujn ĉi informojn cele al akiro de la
po 1o necesaj minimumaj aliĝoj.

Neŭŝatela grup-vespero

Post paŭzo pro la transformado de
la biblioteko rekomenciĝos la
neŭŝatelaj grup-vesperoj, kiuj principe
disvolviĝas en la CDELI-salono la
duan kaj kvaran merkredojn de la
monato de la 19h45 ĝis la 21h45 aŭ
aliloke sekve al propono de invitantoj.
Jen la datoj de tiuj stud- kaj diskut-
vesperoj:

Novembre 9.

Decembre 14: Zamenhofa Festeto.

2006 januare 11 kaj 25.

Februare 8 kaj 22.

Marte 8 kaj 22.

Maje 10.

Junie 14: fondua vespero.

Estas petita partoprenkosto de po
Fr. 4.- por vespero por la kovrado de
la elpezoj. Vigligos tiujn vesperajn
renkontojn Monika Molnar, Claude
Gacond kaj eble aliaj gvidantoj.

-oOo-

Wil

Esperanto-Klubo Wil

Prezidanto: Stanislaw POCHANKE
Lettenstrasse 70, 9500 Wil. Tel.: 071 911 68 30.
Vicprezidanto: Verena CHAVES-WALDER.
Rosenhügelstrasse 22, 9230 Flawil.
Tel.: 071 393 41 49.

Kunvenoj: la unuan merkredon de la monato je
la 19 h 00 en la Restoracio Blumeneck, Sântis-
strasse 1 (malantaŭ la stacidomo).

-oOo-

Zürich

Esperanto-Societo Zürich

Akazienstr. 6 / PF 858, 8034 Zürich-Seefeld
Tel.: 044 251 50 25 <info@esperanto.ch>
reto: www.esperanto.ch/zuriko

Programo

La 2-an dimanĉon de ĉiu monato en
Esperantejo de la 14h00 ĝis la 17h00
libera kafejo kun ebleco babili kaj
renkontiĝi kun geamikoj.


Konversacia kurso ĉiam merkrede
vespere de la 18h00 ĝis la 19h45 en
Esperantejo. (Ĝi ne okazas dum lern-
ejaj ferioj).

Informoj pri tiuj-ĉi aranĝoj rete ĉe
nelida@esperanto.ch, tel. : 044 251
50 25, fakse: 044 261 04 79 aŭ letere:

Esperanto-Societo Zuriko, PF 858,
CH-8043 Zuriko.

Raporto

Prelega vespero de Dietrich Weidmann konis sukceson dank'al anonco en la revuo de la pedagogia altlernejo.



Kongresen

Freneza semajno Mireille Grosjean

Estas du tipoj da personoj : tiuj, kiuj iras al kongresoj por ĝui la kunvenojn, renkonti novajn personojn, trovi malnovajn amikojn ; estas ankaŭ tiuj, kiuj iras por deĵori. Mi estas el tiu grupo. Certe mi ankaŭ renkontiĝis kun novaj personoj kaj retrovis malnovajn amikojn ; tamen mi estis daŭre okupita kaj povis ekskursi nur dufoje : mi faris la urbrondvojaĝon dimanĉe posttagmeze por iom konatiĝi kun ĝi kaj merkrede mi iris al naturo por elurbiĝi.

De 1998 mi frekventas la Universalan Kongreson. Komence mi havis du taskojn : deĵori en la komitato kaj helpi ĉe la ekzamenoj. Ekde 2002 mi plie organizas,

Ĝi havis kiel pozitivan rezulton la malfermon de nova esperanto-kurso meze de septembro.

-oOo-

reĝisoras kaj prezentas la internacian artan vesperon. Do mia agendo estas nigra, pli nigra ol dum la plej terura semajno de la jaro en Les Brenets. Mi devas vekiĝi frue por komenci la tagon frue. Tamen ne tiom frue kiel la estraro de UEA, kiu jam kunvenas antaŭ la matenmanĝo.

Mi alvenis al Vilno vendrede. Mi havis la unuan kunsidon de la komitato sabate je 14.00. Do mi decidis veni al la kongresejo sabate matene por ricevi mian materialon : kongreslibron, urbomapon, ktp. Mi povis ricevi ĝin iom post la naŭa. Mi tuj konstatis, ke estis kolizio inter mia ekskurso kaj la unua renkontiĝo por la Internacia Vespero. Mi devis ŝanĝi tion, trovi novan momenton kaj lokon, trovi la homojn, kiuj respondecas pri la

programo kaj la lokoj, anonci tion en la kongresa gazeto. Jam de la 9a ĝis la dekdua mi kuris kiel freneza abelo en homamaso de la komenco de la kongreso !!! Mi povas preskaŭ diri, ke mi ripozis posttagmeze en la komitato !! Kvarhora kunsido tute normala, eble mi diris unu frazon, aŭ du - kredo min -, mi kapablas silenti. Ni aŭdis raportojn, voĉdonis pri ili, akceptis du novajn sekciojn, unu en Niĝerio, unu en Irano, akceptis novan regularon por la perantoj, starigis elekto-komisionon, ktp.

Mi kunlaboris iom por la ekzamenoj. Estas interesa laboro. Mi devis venigi tablojn (imagu skriban ekzamenon sen tabloj !!), akcepti la kandidatojn, iom prezenti la ekzamenan regularon, korekti skriban parton, trapasigi parolan parton. La interparolado kun la ekzamenatoj ĉiam estas interesa ; ofte ni iom demandadas pri la motivigo de la personoj. Venontjare mi respondecos pri la tuta sesio en Florenco, same kiel mi faros ankaŭ en Homburgo en decembro 2005 : antaŭtesto, skriba parto, parola parto, por du niveloj, elementa kaj meza.

Por la Internacia Arta Vespero mi devas akcepti la homojn, kiuj deziras ludi aŭ kanti aŭ danci aŭ deklami. Se mi jam konas iliajn kapablojn, mi povas venigi ilin por la ĝenerala provludo de vendredo posttagmeze. Se ne, mi aŭdas kaj vidas ilin ĉu marde, ĉu ĵaŭde. Mi devis elekti, meti ĉion kune por havi programon. Elekti signifas rezigni pri la kunlaboro de iu, rifuzi lin aŭ ŝin... malfacila tasko! Mi kunlaboris kun Aida Cizikaite, kiu organizis ĉiujn artajn aranĝojn en la kongreso. Foje estis helpo por mi, foje mi faris ĉion mem, ĉar ŝi estis ege laca. La kunlaboro estis facila kaj fruktodona. Mi aŭdis pozitivajn kaj negativajn kritikojn pri la vespero, do, oni ne povas kontentigi ĉiujn.

Ne demandu min pri la prelegoj, pri la kongresa temo, pri la aŭkcio, mi ne ĉeestis !! Tamen mi estas tre kontenta kaj ĝoja pri mia kongreso. Oni jam dungis min por Florenco en 2006 kaj por Jokohamo en 2007. Venu kun mi !!

Mireille Grosjean.

-oOo-

Andreas Künzli raportas kaj recenzas

Petras Čeliasukas
Litovio dum jarcentoj

Laŭ ia mezuro, la geografia centro de Eŭropo troviĝas norde de Vilno, do en Litovio. Ne nur tion ne scias la plimultaj eŭropanoj (ĉar kun Vilno konkurencas aliaj punktoj ambiciaj je la eŭropa centro), ankaŭ la nacia historio de Litovio estas grandparte nekonata al averaĝa civitano de Eŭropo, kaj nacilingvaj libroj, kiuj rakontas tiun longan kaj interesan historion, kiu pasis grandparte en la ombro de la multe pli konata historio de Pollando, ege malmultas.

La esperantlingva libro *Litovio dum jarcentoj* de Petras Čeliasukas, mult-jara redaktoro de la gazeto *Litova Stelo* kaj honora membro de UEA, aperis jam tri jarojn antaŭ la 90-a Universala Kongreso de Esperanto en Vilno, nome en 2002, en la litova eldonejo Varpas (Kaŭno). En konciza, sed trafa kaj bone strukturita maniero la aŭtoro resumas la historion de sia patrujo ekde la pratempoj, kiam la baltaj litovoj komencis loĝadi en tiu regiono, ĝis la reakiro de la ŝtata sendependeco fine de la 20-a jarcento. La litovoj apartenas al la plej maljunaj popoloj en Eŭropo, kiuj parolas lingvon, kiu konservis arkaikajn formojn de la hindeŭropa pralingvo kaj tial estas ŝate uzata de lingvistoj por komparaj studoj.

La nomo Litovio menciigatas en historiaj fontoj unuafoje en la jaro 1009. En la 13-15-aj jarcentoj Litovio

elstaris kiel grandpotenco en orienta Eŭropo, formante komunan ŝtaton kun la poloj. Legendecaj estas la litovaj regnestroj Mindaŭgas, Gediminas, Algirdas kaj Vytaŭtas. Nur fine de la 14-a jarcento Jogaila / Jagiello pretis (formale) baptiĝi kaj kristanigi sian popolon, ĉar tio estis politike oportuna, kaj tial la litovoj restis la lasta pagana popolo en Eŭropo, ja ilia paralela paganeco eĉ pludaŭris du pliajn jarcentojn. Hodiaŭ Litovio apartenas al la 'plej katolikaj' landoj de Eŭropo. En tiu epoko el-kristaliĝis la unika litova simbiozo kun la pola kulturo, kies politika kulmino estis atingita en 1569 per la Lublina Unio, cementanta komunan ŝtatecon. Ekde tiam samtempe estis enkondukita la falo de Litovio, ĉar unue la poloj kaj poliĝintaj nobeloj litovaj pli kaj pli dominis politike, socie kaj kulture la komunan ŝtaton, dum due la etnaj litovoj mem restis kondamnitaj ekzisti kiel simpluloj kaj kamparanoj sen politika influo, ekonomia prospero kaj kleriga subteno. Ilia lingvo estis abomenata de la polaj sinjoroj. Trie la potenciĝantaj rusoj en orienta najbareco per ripeta atakado de la litova teritorio kontribuis al la ruinigo de la Litova Granda Duklando, kiu ampleksis ankaŭ partojn de Blankrusujo kaj Ukrainio kun etendiĝo ĝis la Nigra Maro. Tial la rilatoj kun la najbaroj, precipe kun la poloj kaj rusoj, estas streĉitaj ĝis nun. La historie memorinda tranĉado aŭ disdivido de Pol-

lando-Litovio en la jaroj 1772, 1793 kaj 1795 inter Rusujo, Prusujo kaj Aŭstrujo finis samtempe ankaŭ la gloran epokon mezepokan de la litova ekzistado. Sekve la litovoj devis elteni la sufokan jugon de la cara regado ĝis 1917/18. Fine de la 19-a jarcento la litovaj lingvo, skribo kaj lernejoj estis entute malpermesitaj.

En 1918 Litovio proklamis sian ŝtatan sendependecon, sed ĉefurbo fariĝis Kaŭno, ne Vilno, pro tio, ke inter la mondmilitoj la tradicia centro litova restis okupita de Pollando. Malgraŭ ŝtatrenverso en 1926 fare de la aŭtoritate reganta prezidento Antanas Smetona, Litovio sufiĉe prosperis ekonomie kaj kulture.

La pluan sorton de Litovio decidis Hitler kaj Stalin en la sekreta aldona protokolo de la t.n. pakto inter Ribbentrop kaj Molotov en 1939, kiam Litovio estis liverita unue al Sovetunio (1940-41), sekve al naci-socialisma Germanio (1941-44), poste definitive al Sovetunio. La sovetan okupacion de sia lando, kaŭze de la anekso far Moskvo, Ĉeliauskas pri-skribas en nigraj koloroj. La litovoj, kiuj devis suferi plej diversajn represaliojn de malpermesoj ĝis deportado kaj fizika ekstermado far la stalinistoj, preskaŭ perdis siajn identecon kaj ekziston. Se en la 1980-aj jaroj Gorbaĉov kaj ties kunlaborantoj ne estus enkondukintaj la epokfarajn reformojn sub la slogano "rekonstruo, publikeco kaj nova pensado", verŝajne la komunisma imperio ekzistus ĝis hodiaŭ kaj Litovio daŭre estus parto de Sovetunio. Neniu povas vere scii tion.

Kun sia historio de Litovio Ĉeliauskas sendube vekas inter esperantistoj intereson pri sia lando, kiu travivis sorton zigzagan kaj tragikan. La ĝenerala tono de la skizo restas iom patriota, kun tradicie kontraŭpolaj kaj kontraŭrusaj akcentoj, ĉar la aŭtoro ellaboris la litovan nacian historion laŭ litova historiografia interpretado (bedaŭrinde mankas fontindikoj kaj bibliografio de la uzita literaturo). Tial ne estas mirinde, ke la libro estis malvolonte akceptita en Pollando. Jen kaj jen estas neglektitaj gravaj detaloj kiel ekzemple la mencio de la signifa rolo de la judoj (kaj karaimoj) en la Litova Granda Duklando (judoj rolis fakte ĝis en la 20-a jarcento). En koncerna ĉapitro ili ja estas resumitaj sub "eksterlandanoj", "metiistoj" k.s. vokitaj en la landon. Tamen alia subĉapitro traktas iom la kruelan genocidon kontraŭ la judoj dum la dua mondmilito, kiu trafis ankaŭ Litovion. Tiu ĉi ekzemplo montras, ke kiel la pola kaj rusa, ĉiukaze ankaŭ la juda temo restas tikla por la litova historiografio. La problemoj de tiuspecaj historilibroj estas: la atingojn kaj suferojn de la propra popolo oni emas glorigi, dum pri la aferoj de aliaj oni pli malpli silentas. Analogajn ekzemplon oni konas ankaŭ el aliaj landoj. Jam Edmond Privat atentigis pri tiu fenomeno en sia libro *Interpopola konduto* ((1935). Se do oni volus vere utili al la perado de objektiva bildo pri la historio de Litovio, kiu estas multfaceta kaj kelkfoje iom nebula, precipe en la mezepoko, necesus ankaŭ konsideri la

verkojn lastatempe publikigitajn de diverslandaj historiistoj, kiuj science okupiĝas pri la temo. Sed por unua konatiĝo inter la esperantistaro kun la historio de Litovio la teksto de Ĉeliauskas taŭgas kaj sufiĉas.

La esperanta lingvaĵo de la libro estas flua, tamen stile kaj gramatike iom slavece influita kaŭze de la karakteriza uzo respektive maluzo de la difinita artikolo 'la' far litovoj, de la 'forgeso' de la persona pronomo (ekz. 'li') kaj de kelkfoje iom siaspeca fraz-konstruo. La esperantigo de lokaj toponimoj estas modera kaj akceptebla, la enkonduko de nekutimaj esperantigitaj formoj interesa (kie eblas Ĉeliauskas referencas al PIV). Krome, la libro estas riĉe ilustrita, sed bedaŭrinde multaj bildoj estas fuŝpresitaj. Cetere ankaŭ la bele eldonitaj gvidlibroj pri Vilno kaj Trakai, tradukitaj de Laimius Stražnickas kaj dankinde donacitaj al ĉiu vilna UK-aliĝinto, 'suferas' ekzakte je la samaj lingvaj 'problemoj' (aŭ fuŝoj) supre menciitaj. Tiu observo ree levas la demandon, ĉu en orienta Eŭropo, kie dominas slavoj kaj baltoj, oni uzas esperanto-lingvaĵon iom diferencon de la uzado kutima en 'okcidento', kie vivas precipe ĝermanoj kaj romanidoj. Rilate la uzon de la difinita artikolo L.L. Zamenhof mem esprimis sin tolereme, tamen lia modela lingvouzado estis ĉio alia ol slaveca.

Andreas Künzli.

PS : Legu ankaŭ ĉi tiun recenzon:
<http://www.esperanto.org/Ondo/R-litva.htm>

-oOo-

Denove interesaj tagoj kun esperanto en orienta Eŭropo

Ĝis kelkaj tagoj antaŭ mia forveturo al la UK en Vilno, Litovio, la 26-an de julio 2005, miaj vojaĝplanoj por la somero estis ne difinitaj. Mi tamen sciis, ke mi veturos la longan vojon tra Germanio, Pollando, Litovio, Latvio, Estonio kaj Ruslando per publikaj trajnoj kaj busoj, tien kaj reen, ĉar mi ne rezervis aviadilojn.

Post tre laciga veturado per trajno kaj buso tra Germanio kaj Pollando, kun halto en Berlino, mi atingis finfine Vilnon, Litovion, la 28-an de julio, vespere, kun kvinhora malfruo. Serĉante la antaŭmenditan hotelon en la litova ĉefurbo, la vojo kondukis min en iom timigan kvartalon, ŝajne tre malriĉan. Kiam alitage mi pli proksime komencis esplori la kvartalon Užuĉpis apud la rivereto Vilnia, mi devis konstati, ke mi trafis al loko tre ĉarma kaj originaleca: temas pri la suba parto de la malnova urbo, kiu pro siaj idiliaj restoracioj kaj artistaj galerioj estas tre ŝatata ĉe la litovaj loĝantoj. La aŭtonoma kvartalo Užuĉpis, kies disfalintaj domoj estas iom post iom restaŭrataj, eĉ proklamis sin sendependa respubliko.

Andreas Künzli.

Reto:
<http://www.turizmas.vilnius.lt>
(ankaŭ en esperanto)

-oOo-

Prelego pri Zamenhof-paroladoj 1905-1912

Matene, la 29-an, iom antaŭ la naŭa horo, mi estis ankoraŭ unu el la solaj en la UK-kongresejo (hotelo Reval), kiu tie serĉis la preleg-aŭditorion. Osmo Buller, direktoro de la CO de UEA, afable invitis min prelegi pri temo sugestita de mi en la jubilea jaro: Zamenhof-paroladoj 1905-1912. Tute ne imagante kio kaj kiu atendas min tie en komplete fremda ĉirkaŭaĵo, mi subite staris iom perpleksa antaŭ plenplena salono. Preskaŭ dum unu horo kaj duono certe pli ol 100 interesitaj samideanoj pacience aŭskultis min – kaj ĉefe la citaĵojn el la zamenhofaj kongresparoladoj de la unuaj jaroj de la universala kongreso. Bela sperto!

Dum la kongreso mi renkontis Bruno Graf, prezidanto de SES, Max Abegg (malnova esperantisto, kiun mi vidis unuafoje!), Christiane Sixtus Pot el Ĝenevo, François Randin, Yvon Grosjean kaj la paro Gerard kaj Florence Cool-Coté. La ĉi-lastaj longe vivis en Svislando, farante gravan movadan servon, kaj nuntempe loĝas en Aŭstrio.

Andreas Künzli.

Reto:

<http://www.uea.org>

Esperantologia konferenco

Por la posttagmeza esperantologia konferenco d-ro Detlev Blanke, la invitanto kaj organizanto, severe admonis min, la rakonteman svison, ke ĉiu havas nur 25 minutojn je dispono por sia prelego. Se iu intencas paroladi pli longe, li aŭ ŝi estos senkompate interrompita! Ho ve! Dum la tagmanĝo mi malaperis en apudan restoracion kaj preparis min tiom bone por tiu prelego, tiel ke mi sukcesis klarigi ĉion antaŭviditan koncize kaj espereble klare pri la temo "Metodologiaj aspektoj de projekto kiel Svisa Enciklopedio Planlingva". Inter la svisoj prelegis ankaŭ Sébastien Moret, asistanto de prof. Patrick Sériot en la laŭzana universitato, pri la temo "Ĉu esperanto aŭ fremdaj lingvoj? Diskutadoj en Sovetlando (1920-1930)". Moret, kiun mi antaŭe ne konis, mem lernis esperanton antaŭ nur du jaroj, evidente prezentis sin unuafoje antaŭ pli granda esperanto-publiko kaj pruvis, ke eĉ sen longa lingvopraktikado eblas fari sciencan prelegon interesan kaj agrablan por la aŭskultantoj.

Reto:

http://www.plansprachen.ch/anlaesse_espkonf05.htm

Tiel la 29-a de julio do finiĝis por mi neatendeble bone, kun multaj kontaktoj en malmulte da tempo, kaj mi povis, kontenta, retiriĝi al la kvartalo Užupis por spiri kaj flari la

pasintajn tempojn de Vilno kaj gustumi la bonegan bieron de Litovio.

Andreas Künzli.

'Mirindaĵoj' dum la Universala Kongreso

Leginte la koncernajn numerojn de la kongresa kuriero *Vilna sonoro* frapis min ĉefe la sekvaj du aferoj. Unue estis anoncote, ke la Alta Protektanto de la vilna kongreso, Valdas Adamkus, prezidento de Litovio, ne aperos en la inaŭguro, ĉar li preferis viziti sportan aranĝon en Kaŭno. Tio certe estis seniluziiga malagrabraĵo ĉefe por la esperantistoj de Litovio, kiuj tiom multe laboras por la esperanto-movado kaj kiuj antaŭ la kongreso pilgrimis al ĉiuj gravuloj de la litova politiko por gajni iliajn atenton kaj apogon. Permesu al mi spekulacii kaj hipotezi: Ĉu la litova ŝtato ne (plu) tiom forte interesiĝas pri esperanto kiel iam antaŭe aŭ kiel litovaj esperanto-responsuloj eble ĉiam kredis? Ĉu esperanto entute perdis sian signifon, tiel ke la Alta Protektanto povis permesi al si persone ignori la vilnan UK-n per neĉeesto? Tamen ĉi tiu kongreso estis unu el la plej grandaj eventoj en la litova ĉefurbo. Malgraŭ ĉio la salutoj de la litova prezidento estis transdonitaj en la inaŭguro fare de lia reprezentanto, la ministro pri eksterlandaj aferoj de Litovio, kaj la mesaĝo de Adamkus estis publikigita en la kongresa kuriero. Por mi persone lev-

iĝis la demando pri la senco de la Altaj Protektantoj - ofte pli malpli pura formalajaĵo evidente iom pridubinda.

Reto: La kongresan kuriero oni povas elŝuti ĉi tie:

<http://esperanto.lt/board/zboard.php?id=kuriero>

La dua punkto koncernas la nomumon de novaj honoraj membroj de UEA, precipe de la polo Roman Dobrzyński. Kiel UEA estis atentigita de iuj polaj esperantistoj kaj kiel raportis *Libera Folio* sur siaj retpaĝoj kaj en speciala kongresa eldono (julio 2005), la nomo de la fratoj Roman kaj Marian Dobrzyński troviĝas sur la t.n. listo de Wildstein, kiu en Pollando estis publikigita en februaro 2005. Ĉi tiu listo mencias la nomojn de polaj civitanoj, kiuj povas esti tiuj de funkciuloj, sekretaj informantoj, sed ankaŭ de viktimoj, kiujn siatempe la komunisma sekreta servo planis varbi. Ĉi tiu iom sensacia kaj kontestata listo, kiu provokis vastegan diskutadon en Pollando, en si mem nenion pravas pri la rolo de la koncernaj personoj pri ilia eventuala rilato al la sekurec-servo. Laŭ la supozo de multaj polaj esperantistoj, la ŝtataj instancoj tiam en la 80-aj jaroj ricevis denuncon de iuj esperantistoj pri la 'kontraŭŝtata' agado de Pola Esperanto-Asocio (PEA). Dua nomumita honora membro de UEA fariĝis Andrzej Pettyn, longjara redaktoro de Pola Radio. Li ne troviĝas sur la Wildstein-listo (ja povus esti). Kiel Dobrzyński ankaŭ Pettyn partoprenis la 'postpuĉajn' estrarojn de Pola Esperanto-Asocio en la 80-aj

jaroj. Iuj rusoj kritikis cetere ankaŭ la honorigon de Boris Kolker, en analoga kunteksto kiel la pola kazo. Do, la historia pasinteco reatingis la aktualecon nuntempan. Ĉar Dobrzyński, Pettyn kaj Kolker laŭ UEA havas elstarajn meritojn por la Esperanto-movado, ili estis nomitaj honoraj membroj.

Andreas Künzli.

Pli pri tio legu en la reto:

<http://www.liberafolio.org/Agado/polapucho/view?searchterm=Pollando>

Nitobe-simpozio

Tuj post la 90-a Universala Kongreso de Esperanto en Vilno estis okazigita la 4-a Nitobe-Simpozio. Ĉi tiu aranĝo, kiu okazis en la prestiĝa Konstitucia Salono de la Litova Parlamento (Sejmo), traktis la kadran temon “Lingvopolitikaj aspektoj de la pliampleksigo de Eŭropa Unio”. Ĝin partoprenis sepdeko da esperantistoj kaj ne-esperantistoj, inter ili sciencistoj, politikistoj kaj diplomatoj. Inter la aŭspiciantoj de la 4-a Nitobe-Simpozio estis la Litova Parlamento, la Universitato de Vilno, la Litova Akademio de Sciencoj kaj Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED), reprezentata de prof. Humphrey Tonkin (Usono) kaj d-ro Mark Fettes (Kanado). Ili afable invitis ankaŭ min partopreni la simpozion. La litova flanko malavare gastigis la Nitobe-partoprenantojn manĝi kaj trinki en litovstilaj restoracioj de Vilno, kaj la vicrektoro de la vilna universitato

gvidis la eksterlandajn gastojn tra sia fama institucio. La vilna universitato estis fondita en la jaro 1579 kiel grava kleriga centro de sia tempo en orienta Eŭropo. En la publika biblioteko estas ekspoziciataj malnovaj libroj, inter ili kelkaj, kiuj antaŭ pluraj jarcentoj aperis en Svislando kaj do evidente trovis la vojon ankaŭ al Litovio.

Kiel prelegantoj dum la Nitobe-simpozio elstaris *François Grin*, profesoro pri ekonomio en la Traduklernejo de la ĝeneva universitato (Svislando), *Philippe Van Parijs* de la Katolika Universitato de Loveno (Belgio), *Robert Phillipson* de Copenhagen Business School (Danlando) kaj *Roland Breton* de la pariza universitato (Francio). Grin, kiu estas specialisto pri ekonomio de la tradukado, ekonomio de la lingvo kaj pri la esploro de publika politiko sur tiuj kampoj, funkcias i.a. kiel konsilanto de la franca registaro koncerne ĝian lingvan politikon. En Vilno la perfekta plurlingvulo (almenaŭ franca, angla kaj germana) prelegis pri siaj esploroj koncerne la kostojn de la lingva instruado en Eŭropo kaj ĉi-kadre prezentis tri ĉefajn scenariojn, kiuj estas konsiderataj kiel solvo: dominado de la angla lingvo, plurlingvismo kaj esperanto. Kiel oni povis legi jam en intervjuo en la ĝeneva gazeto *Le Temps* la 22-an de junio 2005, Grin dume venis al la konkludo, ke esperanto signifus la idealan kaj plej malmultekostan opcion.

La konata brita sciencisto Robert Phillipson, kiu montriĝis tre engaĝita dum kaj post la simpozio, estas unu el

malmultaj de sia gildo, kiu kredas, ke esperanto estas realaĵo kaj ne nur utopia ideo. Li postulas ĝian seriozan konsideron kaj esploron. Tion li konfesas en sia tre leginda libro *Ĉu nur-angla Eŭropo? Defio al lingva politiko*. En sia aktuala kaj provoka libro, kiu estas konsiderata kiel fundamenta verko pri la eŭropa lingvo-politiko (vd. revuon *Esperanto*, aprilo 2005, p. 87), Phillipson traktas la demandon ĉu la nuntempa disvastiĝo de la angla grave minacas la ceterajn lingvojn de Eŭropo kaj kiuj estas la konsekvencoj de lingva hegemonio en politiko, ekonomio, kulturo ktp. Lia libro estis tradukita en esperanton far István Ertl kaj eldonita de UEA en Rotterdamo. Cetere ĉe UEA aperis broŝure ankaŭ la konsiderinda teksto *Internaciaj lingvoj kaj internaciaj homaj rajtoj* (Esperanto-dokumento 37E (2002), kiu estis verkita same de Robert Phillipson.)

Reto:

<http://www.liberafolio.org/Agado/phillipsonchapitro> (libro de Phillipson)

Roland Breton interese raportis pri la lingvaj modeloj en Hindio kaj kiel tiu lando solvis siajn lingvokomunikajn problemojn. Van Parijs, kiu estas konvinkita pri la neceso de Lingua Franca, estas internacie konata ankaŭ kiel “filozofo de la minimuma monenspezo por ĉiuj”. Krom tio, reprezentantoj el la novaj EU-landoj en orienta Eŭropo kaj Kipro klarigis la lingvan situacion en siaj landoj. Iom paradokse: dum la simpozio klare dominis la angla kiel

prelega kaj komunika lingvo (diverslingvaj tradukoj estis garantiataj). D-ro Detlev Blanke, kies prelego sonis en la germana lingvo, direktis kvazaŭ ardan alvokon kontraŭ la ignoro kaj neglekto de la germana lingvo, kaj per tio ankaŭ de pli malgrandaj lingvoj, en la internacia komunikado, kiuj estas kvazaŭ komplete forpuŝitaj de la angla lingvo. (Fakte ankaŭ mi apartenis al la ne pli ol dupersona germanlingva bastioneto).

La simpozianoj alprenis finan dokumenton, kiu sub la titolo “La lingva politiko de EU estas neadekvata” atingeblas sub la retadreso : <http://www.esperantic.org/VilnoNitobeKonkludojFinaj.htm>

Anglalingve:

<http://www.esperantic.org/nitobeconclusionsfinal2005.htm>

Kiel do komenti ĉi tiun simpozion? Mi forlasis ĝin kun la impreso, ke la esperantistoj troviĝas en iom skizofrenia situacio. Unuflanke ili devas agnoski, ke la angla ludas nuntempe (kaj verŝajne ankoraŭ longe) la absolute dominan rolon ne nur en tiaj konferencoj, sed ankaŭ ĉie en la internacia komunikado (scienco, kulturo, politiko, ekonomio, ktp.). Aliflanke ili estas jam de longe konvinkitaj, ke esperanto estus la ideala solvo de la internacia lingvoproblemo. Ĉar laŭ ili teorie kaj praktike esperanto ŝajnas morale superi ne nur la anglan, sed ankaŭ ajnan nur-nacilingvan opcion, pro kialoj ĝenerale konataj al ĉiu esperantisto kaj ankaŭ al multaj neesperantistoj, kiuj konscias pri mondaj lingvoproblemoj.

Por ne veki ĉe la ĉeestintaj eminentuloj neesperantistaj, inter kiuj pluraj evidente principe estas favoraj al esperanto, la impreson, ke la Nitobe-simpozio estas esperanto-propagando-konferenco, la organizantoj evitis, ke oni tro multe parolu pri esperanto mem. Tial iuj demandoj pri la eventuala konkreta rolo de esperanto en unu el la lingvo-komunikadaj modeloj, eble restis neresponditaj. Kaj tial, kiel rezulto en la fina dokumento de la simpozio, la vorto esperanto aperas nur unufoje lige kun alternativaj vizioj, “kiuj esploras la potencialan rolon de esperanto ene de komuna lingvokadro de EU”.

Malgraŭ mia skeptiko ĉefe pri la efiko de tiaj simpozioj, persone mi pledas por la aktiva daŭrigo de la Nitobe-procezo. Ni devas fariĝi pli fortaj kaj memkonsciaj vidalvide de la ekzistantaj strukturoj (kiuj estas ege potencaj kaj konservativaj) kaj ne nur agi el la akademieca eburturo de sciencecaj konferencoj aŭ el la geto de la UK-kongresoj, pli malpli sen esti rimarkite de ekstere. Komprenoble ĉio tio postulas kuraĝon, aktivan laboron, persiston, paciencon kaj monon. Kaj oni ne forgesu, ke multaj kontaktoj jam estas faritaj, en Bruselo, Strasburgo, Vieno, Novjorko, Ĝenevo, Parizo, ktp. Laŭ mi la rezolucioj de la Nitobe-simpozioj devus alpreni pli konkretan formon kaj ne timi montri la dimension de esperanto.

Precipe post la aliĝo de orient-eŭropaj ŝtatoj al EU, la lingva problemo kaj ĝia multekosteco en Eŭropo ŝajne estas evidenta al ĉiuj, ĝia solvo malpli.

Sub la kondiĉoj de multlingveco, kiu estas favorata de la politikistoj en Eŭropo, esperanto povus ludi la rolon de unu el eblaj praktikataj lingvoj, ekzemple en la sferoj de kulturo kaj scienco, krom tio eble ankaŭ en politiko, ekonomio, teknologio. En tiu direkto necesus enkonduki konkretajn eksperimentojn per esperanto kaj realigi pilotajn projektojn, aktive serĉi sponsorojn, kiuj apogas esperanton, vidi en kiuj lingvaj modeloj esperanto povus ekhavi lokon kaj aktive lobii.

Samtempe necesus fortikigi la proprajn organizajn infrastrukturojn, eduki 'profesiajn' esperantistojn, plialtigi ilian nivelon, plibonigi la esperanto-libromerkaton, kiu laŭ mi estas subevoluinta, ktp. Necesus krei stabilan kadron por studi esperanton kaj interlingvistikon en lernejoj kaj universitatoj kaj garantii laborlokojn por profesie okupiĝi pri tiuj fakoj. En tio, ekzemple, UEA povus ludi la esencan rolon kiel motoro kaj kunordiganto.

Reto:

<http://www.esperantic.org/nitobe2005.htm>

http://www.plansprachen.ch/anlaesse_nitobe05.htm

PS. Anoj de la Eŭropa Parlamento evidente tre diverse sintenas al la perspektivoj de lingva diverseco en Eŭropo. Du italaj parlamentanoj ĵus turnis sin al la Eŭropa Komisiono por plendi pri la kreskanta rolo de la angla, kaj por pledi por esperanto. En intervjuo publikigita de la litova novaĝ-agentejo ELTA, du litovaj parlamentanoj aliflanke esprimis sian skeptikan sintenon al esperanto. La intervjuo estis motivita de la ĵusa

Nitobe-simpozio, kiu rekomendis, ke EU konsideru la avantaĝojn de esperanto. Laŭ la litova EU-parlamentano Šarūnas Birutis la rekomendo estas nur reklam-truko de tiuj, kiuj timas, ke esperanton parolos ĉiam malpli da homoj.

Andreas Küünzli.

Legu pli :

<http://www.liberafolio.org/>

Kontaktoj kun esperantistoj en la balta regiono

Survoje de mia longa vojaĝo tra Litovio, Latvio, Estonio, Ruslando kaj Pollando (pri kio mi eble rakontos alian fojon) mi havis la okazon renkonti aŭ viziti plurajn elstarajn aktivulojn de esperanto kaj interlingvistiko.

Tartu - Estonio

En Tartu, dua urbo de Estonio, vivas la konata interlingvisto Aleksandr Dmitrieviĉ *Duliĉenko*, kiu laboras kiel profesoro de slavistiko en la tartua universitato. Surloke li rakontis al mi pri la nova eldono de la kajero *Interlinguistica Tartuensis*, kiu estas dediĉita al la temo "eŭroloingvistiko". La volumo, kiu enhavas la prelegojn prezentitajn kaj kontribu-aĵojn senditajn dum scienca konferenco omaĝe al Paul Artiste ĉijare en Tartu, aperis kaj estas baldaŭ mendebla ĉe CDELI. Alia interesa eldonaĵo nomiĝas *Cejano*, kiu estas produktita de la tartuaj esperantistoj,

inter kiuj elstaras s-ro Madis Linna-mägi. Ankaŭ tiu eldonaĵo estos konsultebla en CDELI. La plej freŝa eldono enhavas tre legindan rakonton de prof. Duliĉenko pri lia iom ĝangala vojo al interlingvistiko kaj pri liaj spertoj kun esperantistoj.

Cejano estas speco de centaŭreo, konata trudherbo en grenkampoj de Eŭropo kaj Azio, kun intense ĉielbluaj floroj kaj lancetformaj folioj. En kolormodeloj ĝi signifas la kompletan koloron de ruĝo. Ĉar ruĝo estas grava en adiciaj kolormodeloj, cejano estas grava en subtrahaj kolormodeloj, ekzemple por inkaj presiloj. Hodiaŭ ĝi estas malofte renkontebla pro vastskala uzado de herbicidoj.

Kaliningrado - Ruslando

En la ruslanda urbo Kaliningrado, iama Kenigsbergo, mi estis akceptita tre afable laŭ la tradicio de la rusa gastamo de la familio de *Aleksandr Korĵenkov*, liaj edzino *Halina Gor-ecka* kaj filo *Aleksej*. Antaŭ kelkaj jaroj ĉi tiu esperantista familio decidis translokiĝi de Jekaterinburgo en Uralo al Kaliningrado, por esti iom pli proksima al Eŭropo. Aleksandro kaj Halina produktas la signifan Esperanto-gazeton *La Ondo de Esperanto* (mi invitas la svisojn aboni ĝin) kaj eldonas, kadre de *Sezonoj*, havindajn esperanto-librojn, kiuj povus riĉigi vian propran esperantobibliotekon. Ekzemple ĵus aperis *Historio de Esperanto*, kiu estas verkita de Korĵenkov mem kaj tre leginda precipe por komencantoj. Korĵenkov estas ankaŭ kursgvidanto dum multaj esperanto-aranĝoj, ekzemple Balta

Esperanto-Forumo, kiu invitas siajn partoprenantojn venontjare al Bjalistoko en Pollando, naskiĝurbo de L.L. Zamenhof.

Alia interesa esperantisto, *Alen Chris* (pseŭdonomo), vivas kelkdek kilometrojn for de Kaliningrado iom kaŝite en la arbaro, kie li konstruas sian domon kaj okupiĝas pri siaj propraj projektoj. Liaj legendaj editoriaĵoj verkitaj por *La Ondo de Esperanto* malkovras la dimension de tiu rimarkinda intelektulo, kiu rezignis pri la moderna civilizacio por esti plene en kaj kun la naturo.

El Kaliningrado devenas ankaŭ nova stelulino de la esperanta muziko: *Natalia Striĵnjova*. Ŝi prezentis sin unuafoje en UK Vilno kaj tuj gajnis la korojn de la esperantistoj. Sian stilon ŝi difinas kiel "estradan popon". Ŝia voĉo, precipe ŝia prononco de esperanto, estas nekutime polurita kaj klara, se oni konsideras ke ŝia parolpraktiko ĝis nun limiĝis al minimuma konversaciado kun aliaj esperantistoj.

Reto:

<http://www.esperanto.org/Ondo>

Pollando

La sekva stacio por mi estis la urbo Malbork, iom sude de Gdańsk, kie mi estis amike akceptita de s-ro *Edward Kozyra*. Li estas la plej aktiva esperantisto de la urbo kaj unu el la gvidantoj de Pola Esperanto-Asocio (PEA). Kozyra gvidis min tra la 'Parko de la Mondo' (aŭ: 'Skvaro Esperanto'), kie estas viziteblaj la tiel nomatajn 'ZEO-jn', t.e. la 'Zamenhofaj Esperanto-Objektoj'.

Temas pri speco de memor-ŝtonoj dediĉitaj al diversaj landoj kaj inaŭguritaj de signifaj esperantistoj. La afablan inviton de Edward inaŭguri ankaŭ 'svisan ŝtonon' mi dankinde akceptis por pludoni ĝin al la svisa esperantistaro. Kiel kulmino de la promenado tra Malbork elstaris la vizito al la eminenta teŭtona kastelo Marienburg, kies labirintajn intestaĵojn la brila ĉiĉerono Edward Kozyra konas parkere kaj prezentas al la gasto en tre trafa kaj amuza maniero. Fakte Malbork apartenas al tiuj same esceptaj kiel mirindaj lokoj, kie la esperanto-movado ĝuas la apogon de la urba administrado kaj entretenas klubejon de la loka Esperanto-Societo, kiu situas ĝuste en la urbodomo mem. Karaj svisaj esperantistoj: Se vi do planas viziti Malborkon en Pollando, nepre antaŭe kontaktu s-ron Kozyra, kiu tre volonte pasigas la tempon kun vi.

Reto:

<http://www.malbork.pl> (ankaŭ en esperanto)

De Malbork la trajno transportis min finfine al Lublino en sudorienta Pollando, kie atendis min amiko *Tomasz Chmielik*, alia elstara esperantisto pola, esperantisto kaj instruisto el Pollando kun speciala simpatio al Svislando, la svisaj kulturo kaj literaturo. Chmielik estas bone konata al la svisaj esperantistoj kiel kursgvidanto en La Chaux-de-Fonds aŭ kiel tradukinto de la verkaro de Dürrenmatt, Bichsel, Grass, Singer, ktp. Krome Chmielik tradukis el la juda kaj pola lingvoj multajn rakontojn kaj romanojn de Isaac Baŝevis Singer, Ŝolem Aleĵhem,

Ichok Lejbuŝ Perek, Ŝalom Aŝ, Bolesław Prus, Bruno Schulz, Hanna Krall, Ryszard, Kapuściński, Andrzej Szczypiorski. Inter 1993 kaj 2003 li ordigis kaj eldonis kajerforme kaj sur KD-oj en sia eldonejeto *LIBRO-MONDO* (Svidniko) ĉiujn franc-lingvajn artikolojn de Edmond Privat, kiujn ĉi tiu aperigis de 1919 ĝis 1962 en la gazetoj *Le Droit du Peuple*, *La Sentinelle*, *Le Travail*, *La Coopé-*

ration, *Le Coopérateur genevois* kaj *L'Essor*.

Tra Krakovo, Silezio, Saksio kaj Bavario mi rehejmiĝis al Berno. Tiel okazis mia vojaĝo, kaj kion mi vidis kaj travivis en tiuj landoj certe estis grandioza kaj neforgesebla.

Andreas Künzli.

-oOo-

Bad König Bruno Graf

Kia bela nomo! Temas pri banloko en Germanio, en la regiono Odenwald, kie Germana Esperanto-Asocio jarkongresis de la 5-a ĝis la 8-a de majo. Odenwald situas sudoriente de Frankfurt am Main kaj tie arbaroj plimultas ol kamparoj. Estas idilia, kvazaŭ forgesita mondo, germane dirite “heile Welt”, kiu kontrastas kun la grandaj urboj laŭlonge de Rejno.

100 homoj kunvenis en Bad König por ĝui vere interesan kaj riĉan programon. Granda nombro, sed oni imagu, ke GEA havas 1200 membrojn. La asocio havas bonajn strukturojn, sed samajn problemojn kiel ni en Svislando. Eŭropa Unio kreas dinamikon kaj malfermas platformon por esperanto.

La estraro videble flegas la kontaktojn kun politikistoj kaj la publiko. La ĉefministro de Hessen sendis trafajn salutvortojn. Eŭropa parlamentano de la regiono partoprenis la bankedon kaj alparolis la kongresanaron. Interesitaj homoj de

la urbeto venis al informhoro. En la stratoj kaj magazenoj oni perceptis verdajn flagojn kaj afiŝojn.

La jarkunveno estis tre bone vizitita kaj disvolviĝis en bona atmosfero. La estraro estas reelektita, kun novaj vizaĝoj por prezidanto, trezoristo kaj redaktoro. Landaj Ligoj kaj fakaj organizaĵoj raportis kaj vikle diskutis. GEA disponas pri kleriga centro en Herzberg am Harz, kie hungarino lanĉas novan koncepton pri oficialigo de esperanto, zorgas pri bona planado kaj disvolviĝo de la kongresoj. Tiujare nur mankis libroservo.

La kultura programo brilis pro eminentuloj. Herbert Mayer parolis pri Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno. G. Handzlik surprizis ne nur per gitara kantado, sed ankaŭ per prelego pri la Eŭropa Parlamento, kie lia edzino reprezentas Pollandon. Nobelpremiito Reinhard Selten traktis la temon “La distribuo de lingvaj spertoj kiel ludoteoria ekvilibro”. Aleksandr Korjenkov prezentis

verkojn de Ĉekov kaj Halina Gorecka komentis la vojon de Kenigsbergo al Kaliningrado: 750 jaroj. Teatra frandaĵo estis la burleskaĵo “La 90-a naskiĝtago”, kies angla versio “Dinner for One” videblas televide ĉiam jarfine.

Ne mankis gviditaj urbetaj rondiroj, spite de pluvema-frosta vetero, kaj ekskurso al Erbach por viziti la grafan kastelon aŭ la faman eburan muzeon. Vinemuloj aĉetis bileton por vingustumado, kie estis prezentitaj blankaj vinoj de la regiono, kiuj estas laŭdire pli bonaj, ol la ruĝaj.

La prezidanto de GEA, Andreas Emmerich, kiu foje prelegis en Bern, invitis min delonge partopreni

germanan kongreson. La ĉeesto estis instruiga kaj kuraĝiga leciono. Dum oni kelkfoje malkuraĝiĝas en limigita enlanda agado, oni malkovras la fortojn en pli granda kunligo kaj kreskas la emo al internacia kunlaboro. Depost jaroj mi profitas el tiu kunlaboro, de la helpema sekretario Ursula Niesert, kaj ĵus nun Germana Esperanto-Junularo presis cent mil informkartetojn, kiujn ankaŭ ni disdonas en Svislando.

Bruno Graf.

-oOo-




Foto Monika Molnar

La ursoj kaj la kangurooj lernas esperanto-kantojn kun Olivier Tzaut.

2005 : memorjaro Einstein

Granda ekspozicio en Berno nuntempe rememorigas pri la vivo kaj verko de Albert Einstein. Aperis ankaŭ libro¹ pri la rilatoj de Einstein kaj Svisio.

Kvindek jarojn post la morto de la laŭreato de Nobel-premio kun svisa pasporto kaj cent jarojn post la publikigo de lia fama teorio pri la speciala relativeco (1905), granda ekspozicio en Berno rememorigas pri li. En la jaro 1895 li venis por la unua fojo al Zuriko kun la intenco studi en la Federala Politekniko, sed estante tro juna ne sukcesis trapasi la ekzamenon. Oni konsilis al li la kantonan gimnazion en Aarau por akikri la abituriantan diplomon. La deksejarulo profitis tie de la liberala spirito de mezlerneja instruisto kaj de la familio lin loĝiganta. Estis kontrasto al la prusa edukado kiun spertis Einstein en Germanio. Tio estis probable la kaŭzo kial li rezignis jam en 1896 je sia germana ŝtataneco kaj akiris la svisan pasporton. En Zuriko li studis inter 1896 kaj 1900 en la Federala Politekniko, kie li trovis amikojn por la vivo kaj sian postan edzinon, la kunstudentino Mileva Maric. De 1902 ĝis 1909 ili vivis en Berno, kie Einstein prilaboris sian faman teorion pri relativeco kaj trovis laboron kiel

oficisto en la ŝtata patentoficejo. Lia revo pri universitata kariero realiĝis kiam li iĝis profesoro en la universitato de Zuriko por la nova fako de teoria fiziko. 1914 li translokiĝis al Berlino, sed baldaŭ komenciĝis la unua mondmilito kiun li malaprobis – kontraŭe al multaj intelektuloj. Li konsideris naciismon kiel mensmal-sanon. La edzeco kun Mileva Maric ne estis feliĉa kaj post longaj kvereloj ili disiĝis havante tri infanojn. En 1919 li poste edziĝis al sia kuzino Elsa Einstein. En la jaro 1929 li ricevis la Nobel-premion por fiziko, elmigris en 1933 al Princeton, tie akiris en 1940 la usonan ŝtatanecon kaj mortis 76-jara.

« Kion mi pensas pri Svisio? Mi ŝatas la svisojn, ĉar ili estas entute pli humanaj ol la homoj ĉe kiuj mi vivis alie. Cetere mi respektas Svision kiel ŝtaton ĉar ili sukcesis havi en tempo de ĝenerala histerio ĉiam sufiĉe prudentan registaron kaj rezistis al ekstera premo. Aliflanke mi devis bedaŭrinde ekscii, ke Svisio havis kiel ŝtato koncerne rifuĝintojn ofte brutalan sintenon neniel pravigeblan, eĉ rilate tiujn kiuj estis allasitaj en ĝia teritorio. Tio estis certe maldigna se oni konsideras ĝian vere bonan tradicion kiel azilŝtato. La unuopuloj neoficialaj tamen kondukis bone kaj ofte helpis per grandaj materiaj oferoj. »

Albert Einstein en 1948 responde al demando de sia berna konatulo Gustav Wissler

¹ Schwarzenbach, Alexis, Das verschmähte Genie (La malestimata genio. Albert Einstein kaj Svisio). DVA-Verlag, München 2005.

Scienco de libera spirito

La revoluciaj teorioj de Albert Einstein

Ernst Peter Fischer² prezentas en popularscienca maniero la kontribuon de Albert Einstein al la teoria kaj praktika fiziko de la 20a jarcento.

La fizikon kiun lernis Albert Einstein devenas de la 19a jarcento. La fiziko kiun ni hodiaŭ lernas devenas de Einstein kaj do de la 20a jarcento. Kiam oni diras, ke li ekis revolucian ŝanĝiĝon en sia scienco kaj se ni volas kompreni ĉi tiun renovigon, tiam restas neniuj alia vojoj ol reiri al la scioj kiujn la juna Einstein povis akiri kiel studento.

Al la grandaj fizikistoj de la 19a jarcento apartenis la skoto James Clerk Maxwell, kiu resumis per ege rafinita matematika lingvo multajn observojn de sia tempo en kvar ekvacioj. Ili famiĝis kiel la ekvacioj de Maxwell, preskaŭ adorataj de la tiamaj fizikistoj. Ankaŭ Einstein estis kiel studento sub la fascino de la Maxwell-ekvacioj, per kiuj malfermiĝis nova scienca branĉo hodiaŭ nomata elektrodinamiko. La ŝajne komplikajn terminojn oni povas facile disigi en la du vortojn, la dinamiko kaj la elektriĉo, kaj tiam oni komprenas pri kio temas: pri la movoj de elektriĉo.

² Ernst Peter Fischer estas profesoro pri historio de la sciencoj en Konstanco (G) kaj aŭtoro de pluraj libroj pri Einstein, inter aliaj « Einstein in der Westentasche » (« Einstein en la veŝta poŝo », Piper, 2005). Ĉi tiu teksto estas traduko de germanlingva artikolo aperinta en « St.Galler Tagblatt », 11-5-2005 (trad. R. Schneller).

La teorio de Maxwell kaj Newton

Ni do alvenas al la plej konata kaj centra laboro de Einstein kiun li publikigis en la mirjaro 1905 kaj kiu metis la bazon por nova kompreno de spaco kaj tempo aperinta sub la titolo « Pri la elektrodinamiko de movataj korpoj ». En siaj pripensoj Einstein eliras de la supre indikita teorio de Maxwell. Li provas interligi ties ekvaciojn kun alia – iom pli aĝa – kolekto de naturleĝoj, kiujn oni konas ĝenerale kiel la fizikon de Newton. Isaac Newton formulis jam antaŭ la jaro 1700 la primovadajn leĝojn, kiujn ni lernas en lernejo kaj per kiuj ni povas ekzemple kalkuli la distancon de bremsado sur seka strato se oni subite devas halti.

Cetere legeblas en kelkaj libroj, ke la fiziko de Einstein anstataŭis la mekanikon de Newton, sed tio estas nur parte vera. Se hodiaŭ la NASA sendas sateliton tra la universo, ties movoj kalkuliĝas precipe per la movaj leĝoj de Newton danke al kiuj oni sukcesis surluniĝon.

La korektoj de Einstein ludas en tio praktike nenian rolon. Ili aplikiĝas en aliaj lokoj kio kondukis lin al miriga penso. Ĉar unuflanke la ekvacioj de Newton kaj tiuj de Einstein sufiĉe bone priskribas la plej multajn movojn kaj aliflanke ambaŭ penskonstruoj sin bazas sur komplete diversaj elirpozicioj, oni povas fari la strangan konkludon ke fizikaj teorioj estas « liberaj

elpensoj de la homa spirito », kiel esprimis sin Einstein en sia libro « Mia mondkoncepto ». Per tio li konfirmis kiel praktikanta fizikisto la aserton de la germana filozofa Immanuel Kant en lia « Kritiko de la pura racio », ke la homoj ne trovas la naturleĝojn en la naturo sed pli vere preskribas ilin al ĝi. Neniu tion pli bone sciis fari je la komenco de la 20a jarcento ol Einstein.

Konstrudifekto en la sistemo

Kiam la juna Einstein studis fizikon, ĉiuj profesoroj instruis en apartaj lekcionoj ĉion sciendan pri la du grandaj kolonoj de la fiziko – la mekaniko de Newton kaj la teorio de Maxwell – kaj ŝajne ili ne rimarkis, ke la du konstruoj ne povas ekzisti senpere unu apud la alia. La kaŭzo estis specialaĵo de la teorio de Maxwell. Ĝi temas pri elektrikaj kaj magnetaj kampoj kaj povas montri ke eta magnetika kampo konstruas fulmrapide same etan elektrikan kampon, kiu siaflanke denove generas duan magnetan kampon (kiu malaperigas la unuan). Dum ĉi tiu konstruo kaj malkonstruo ekestas elektromagneta oscilado, kiun ni perceptas kiel lumon. Tiel vidis ĝin Maxwell kaj lernis ĝin Einstein.

Tiu lasta ŝatis la simetrian de pensado kaj ekvacioj, li estis despli ĝenata ĉar ĝi mankis rilate la fizikon de Newton. Ĝi mankis kiam temis pri la rapideco de la oscilado, kiu konsistigas la lumon. Liaj ekvacioj strange anticipis ke ĉi tiu rapideco estas konstanta kaj ne dependas de la loko de la observanto. Tio ne estas tuj evidenta kaj tial neniu miris ke la afero ĉe Newton

aspektis aliel. En lia sistemo rapidecoj adiciigas, kio signifus ekzemple ke lumo de movata poŝlampo pli rapide eliras ol de senmova. Tio ne estas la kazo kaj io ne akordiĝas: ie en la konstruaĵo de la fiziko devis esti konstrudifekto kiu ŝajne ne zorgigis la profesorojn kies lekcionoj Einstein sekvis.

Libera invento de la spirito

Por Einstein la afero estis klara. Ĉar la ekvacioj de Maxwell kaj tiuj de Newton devis akordiĝi, ekzistis la neceso efektiviĝi korekton en unu de la du sojloj, kaj Einstein decidis ne tuŝi la sistemon de Maxwell kaj pli fajne prilabori la fizikon de Newton. Li kuraĝe fiksas – libera invento de la spirito – ke la rapideco de la lumo estu konstanta kaj metis al si la nefacilan taskon ellabori la konsekvencojn. La rezultojn de lia pripensado li prezentis en la jam citita verko el la jaro 1905. En ĉi tiu laboro li speciale avertas la leganton ke la hipotezo de konstanta rapideco de la lumo unuavice ŝajnas sensenca, sed ke oni tamen bonvolu plulegi, ĉar per ĉi tiu elira pozicio malfermas sin novaj aspektoj, nome tre mirigaj kaj cetere pruveblaj per eksperimento (kio poste efektiviĝis).

Heredita de Newton estis la ideo, ke spaco kaj tempo estas io absoluta. Ekzistas la spaco en kiu ni kaj la universo restadas. Ĝi devenas – laŭ Newton – de Dio kaj ne havas alian kondiĉon. Ĝi do estas laŭvorte senkondiĉe donata. La samo validas rilate la tempon, kiu iras sian vojon senindulge kaj sendepende de ĉiuj kondiĉoj.

La grandoj de la pensado relativigitaj

Spacon kaj tempon oni konsideris kiel absolutajn grandojn antaŭ la veno de Einstein. La esprimo « Teorio de la relativeco », per kiu oni karakterizas lian komprenon, vidigas lian revolucion faron. Einstein relativigis la bazajn grandojn de nia pensado. Li montris ke oni devas interligi la spacon kaj la tempon, ke spaco kaj tempo kunekzistas kaj ke ni vivas en spaco-tempo. En ĝi la tempo, kiun oni mezuras, dependas de la pozicio, kiun horloĝo havas en la spaco.

Tio estas la ĉefaĵo en la teorio pri relativeco, kiun prezentis Einstein en 1905 kaj kiun oni precizigas per la atributo « speciala », ĉar ekzistas ankaŭ « ĝenerala teorio de la relativeco ». Ĝin ellaboris ankaŭ Albert Einstein, sed necesis 10 pliaj jaroj kaj ĝi aperis en 1915. La teorio de la speciala relativeco konsideras la priskribon de la mondo kaze ke la observanto ne moviĝas, dum aliulo – ekzemple sur ŝipo – preterpasas; la ĝenerala teorio de la relativeco pri-konsideras iun ajn kazon de movo. La plilarĝigo de la teorio estas necesa, ĉar ni mem sur la tero efektivigas tian movon. Ni moviĝas sur planedo, kaj ĉi tiu turniĝas ĉirkaŭ nia astro, dum la tuta sunsistemo migras tra la lakta vojo, kiu siaflanke ne restas senmova. Se fizikaj leĝoj havu sencon, ili devas esti formulitaj en ĉiu ajn movata koordinata sistemo, kio metis kondiĉojn al ĉiuj observoj pristudataj de Einstein. Liaj pripensoj kondukis tre baldaŭ – preskaŭ devige – al la bazaj grandoj de spaco kaj materio kaj strange evidentigis denove ke kuniĝas

io kion la sana homa menso apartigas. Laŭ kutima kompreno substanco ja havas sian lokon en la spaco – ĝia pozicio – sed plue nenion faras. Kontraŭe Einstein montris ke substanco influas la spacon. Ĝi ŝanĝas ties geometrion, ĝi kurbigas la spacon. Ĉi tiu stranga kurbigo de la spaco – kiu en la jaro 1919 estis pruvita per eksperimento de britaj astronomoj kaj fizikistoj en la tropikaj regionoj – fine famigis Einstein tutmonde.

Interrilata percepto

Kun ĉi tiu plivastigo de la teoria konstruaĵo eblis unuafoje kompleta kaj kuniga percepto de la kosmo, al kiu la unuopaj teorioj alportas sian respektivan parton. Laŭ la teorio de la speciala relativeco spaco kaj materio estas interligitaj – kiel skizite supre – same tempo kaj energio. Laŭ la fame konata formulo $E = mc^2$ ankaŭ energio kaj materio estas interligitaj. Ili do ĉiuj intrerligiĝas kaj interdependas – la spaco, la tempo, la materio kaj la energio. Finfine oni devas pensi ilin kiel unueca formaĵo, konata en pli fruaj tempoj sub la nomo « prima materia » (prasubstanco), el kiu ĉio alia eliris.

Ĉar ĉi tiuj praj rilatoj ekzistas, ni povas – danke al Einstein – unuafoje en la homa kulturo racie kaj sisteme mediti pri la komenco de la universo. Hodiaŭ ni imagas ĝin kiel praeksplosion per kies movenergio estiĝis la kvar fenomenoj spaco, tempo, materio kaj energio.

Kontraŭe al tio Einstein en sia pensomovo ne eliras de ĉi tiu absoluta komenco por alveni al nia hodiaŭa situacio, sed li eliras de nia situacio

por reiri al la komenco. Li pripensas la eblon restarigi la malplenan absolutan spacon, pri kiu Newton diras, ke Dio kreis ĝin. Bedaŭrinde tio ne eblas, kiel Einstein klarigas en mirinda frazo, kiu resumas la teorion de la ĝenerala relativeco kaj ankaŭ aliajn pripensojn : « Antaŭe oni kredis ke, se ĉiuj

aĵoj malaperas el la universo, tiam restos ankoraŭ spaco kaj tempo ; laŭ la teorio de la relativeco eĉ spaco kaj tempo malaperas kun la aĵoj. » Ili malaperas pro tio ke ili ligiĝas ne-separeble al la aĵoj, kiel Einstein eltrovis – sen diri al ni, kiu aranĝis tion tiamaniere.

90a Universala Kongreso de Esperanto en Vilnius

*La UEA-kongreso kun 2000 partoprenantoj estis eventego en la esperanta mondo. Ĉu tia amaskunveno tamen ofertas kvaliton
Jen kelkaj rakontoj kaj pripensoj.*

Ĉar tiun jaron la esperantistoj festis la 100-jariĝon de la Universalaj Kongresoj la kongresa temo « 100 jaroj da interkultura komunikado » direktiĝis ĝuste al la Universalaj Kongresoj, kiuj okazis post Bulojnosur-Maró. Dum la prezento de la temo pluraj ĉeestantoj rakontis la pozitivan ŝokon de sia unua kongreso. Por mi la unua kongreso, antaŭ dekoj da jaroj en Madrido, male ne estis tiom pozitiva. Tiam mi preferis la TEJO-kongresojn, la Internacian Seminarion en Germanio, pli etajn, pli familiecajn, pli junecajn. Dum pluraj jaroj mi konservis tiun opinion kaj ne multe frekventis tiujn vaste partoprenatajn aranĝojn. Sed intertempe mi maljuniĝis kaj pli regule partoprenis UK-ojn. Mi komencis ĝui ties etoson pli kaj pli kaj mi ŝatas tiujn urbojn de la mondo, kiuj laŭ la jaroj fariĝas kavazaŭ esperantistaj ĉefurboj, kie aŭdiĝas la internacia lingvo en la stratoj kaj sur la kafejaj terasoj. Mi tamen ne volas diri, ke

UK-oj koncernas nur maljunulojn. En Vilnius mi renkontis plurajn gejunulojn, kiuj bone ĝuis la kongreson, certe kun foje apartaj programeroj. Ĉar la agrabla punkto de kongresoj, ne nur en UK-oj, estas tiu ebleco aranĝisian propran programon, travivi iel sian propran kongreson, mia prezento tie estos nur propra travivaĵo en kiu eble aliaj rekonos sin. Alvenante en novan kongreson vi tuj avide studas la kongreslibron, post longa viciĝo por ĝin ricevi. Vi tuj substrekas la interesaĵojn, krajone, por povi ŝanĝi, ĉar ne malofte du interesaĵoj estas programitaj samtempe. Kun la ricevitaj kongresdokumentoj ĉiuj partoprenantoj tiun jaron havis la surprizon trovi belegan gvidlibron pri Vilnius, pli ol ducent-paĝa belaspekte bindita libro, la saman, kiun ni povis vidi en ĉiuj urbaj librovendejoj en diversaj nacilingvoj. Kaj sur la urba mapo ni tuj povis vidi, ke la kongresejo, je la bazaj etaĝoj de la impona Hotelo Reva, situas en moderna kvartalo, tamen tutproksime de la antikva urbo aliflanke de la riverego Neris. Estis plezurego ĉiumatene transiri la ponton Zaliasis Titlas, ĉepiede de la barokaspekta preĝejo Sankta Rafaleo, kie

okazis la esperantlingvaj diservoj. Dimanĉe matene por iri al la inaŭgura malfermo dekoj da urbaj busoj atendis kongreseje por veturigi nin tra la strato Kalvariju ĝis grandega halo, la salono Zamenhof, en la Vilniaus Siemens Arena. La du mil ĉeestantoj sentis sin iom perditaj en tiu giganta ejo. Tiu busa servo bone funkciis ankaŭ por aliaj aranĝoj kiel la naciaj kaj internaciaj vesperoj kaj por la solena fermo.

Kongresa temo

Por reveni al la Kongresa temo reĝisorita de Ulrich Lins, mi malfeliĉe povis partopreni nur la prezenton, kaj el ĝi mi konservis la sekvajn notojn: Ĉu niaj Universalaj Kongresoj ne estas tro elitistaj? Efektive neniuj afrikano tiun jaron povis ĝin partopreni, kaj la hoteloj ofte multe kostis kiel en ĉiuj kongresurboj. Kubano longe esprimiĝis pri tiu realo, kaj konsideris kun bedaŭro, ke niaj kongresoj respegulas la nunan mondordon. Ĉu ili ne okazas en gento tro fermita? Eble, kvankam ni memoras la okazigojn de la Nitobe-seminarioj kun partoprenantoj neesperantistaj en Berlino kaj en Pekino kaj la invito en Gotenburgo de la verkisto Charles Durand, kiu dum la kongreso konvikiĝis pri la intereso kaj la efiko de nia internacia lingvo. Eble indus rekomenci similajn spertojn?

Klerigaj lundoj

Nova kaj sukcesa interesa rubriko de la kongresoj, jam spertita en Gotenburgo kaj Pekino, estas la Klerigaj lundoj. Temas pri blokoj de prelegoj okazantaj samtempe en diversaj salo-

noj. La sukceso de tiu prelegaro estis tiom granda ke la salonoj, foje tre malgrandaj, estis rapide plenŝtopitaj kaj iam malfacilis eniri, ĉefe kiam, same kiel mi faris, vi komence eraris pri la salono de la prelego kaj volis poste ŝanĝi salonon. Mi estis kondamnita provi kapti prelegerojn pri la litova lingvo, stare sur sojlo, malkomforte klinita antaŭen por eskapi la ekstersonajn konversaciojn! Domaĝe ĉar la prelego ŝajnis interesa. Universala Kongreso estas ankaŭ la okazo konatiĝi kun la gastiganta lando kaj ties ĉirkaŭaĵo. Tiun jaron mi ne povis sekvi la « Litovan eksprese », sed ĵus post la prelego pri la litova lingvo la salono iom malpleniĝis kaj, post prelego jam aŭdita pri la deportitoj en Latvio, mi povis informiĝi pri la nuna situacio de Kaliningrado, tiu rusa enklavo inter Pollando, Belorusio kaj Litovio, el la buŝo de Halina Gorecka, redaktorino de « La Ondo de Esperanto ». Kaliningrado havas turmentitan historion, ĝi fariĝis enklavo pro la sendependiĝo de Litovio kaj Belorusio el antaŭa Sovetunio, kaj pro tio oni devas ricevi vizon por ĝin eniri, kaj la loĝantoj, kiuj volas iri eksterlanden, devas vojaĝi ĝis Moskvo por ricevi vizon. Ĝis 1946 nomita Kenigsbergo, ĝi estis fondita de teŭtonaj kavaliroj kaj poste fariĝis ĉefurbo de orienta Prusujo. Pli poste ĝi apartenis al germana imperio kaj komence de la 20a jarcento estis donacita al Pollando kun la gdanciga koridoro. Ĝi estis, fine de la mondmilito senkompatate bombadata de la « aliancanoj ». Post tiam okupata de Sovetunio ĝi estis rekonstruita laŭ tiama soveta stilo kaj perdis sian germanecan animon. – Alia bloko

interese informis pri la diversaj kulturcentroj esperantistaj, pli multnombraj ol mi atendis. Ne nur Greziljono, Bouresse, KCE, sed ankaŭ la « Interkultura Centro Herzberg » ĝemelita kun pola centro en Zsófia Kóródy, la Berlina Esperanto-domo (kiu bedaŭrinde brulis la 6an de septembro), la Mondturisma Lernejo de Bydgoz, centro apud la lago Balatono en Hungario, centro en Seulo, kaj fine la fama brazila centro Bona Espero, kiu de 38 jaroj tutjare funkcias plensukcese.

Internacia Kongresa Universitato (IKU)

Ĉiam altnivelaj estas la prelegoj de IKU. Mi estis absolute ĉarmita de la prezento de Vilmos Benczik pri « Skriba kaj voĉa Esperanto: la internacia lingvo en semiotika spegulo ». Mi ĉiam miras kiom altnivela prelego, eĉ malfacila, estas facile sekvebla kiam ĝi estas klare kaj interese prezentita. Alia majstra preleganto estis Jouko Lindstedt, kiu brile provis konvinki nin, ke la lingvoj ne havas aĝojn, kaj ke la litova ne povas esti konsiderata pli aĝa ol esperanto. Mi eble ne estas sufiĉe sciencema sed mi ne kapablis konvikiĝi kaj pensis, ke la sciencistoj foje havas nesekveblajn cerbumadojn! Honto al mi! Universitatnivele oni eĉ povis ricevi kompletan kaj gajan informon pri « vampiroj » fare de Jane Edwards, direktoro de la programoj de la universitato de Harvard.

Diversaj aliaj prelegoj

Ekster tiu universitata prelegaro, IKEL (Internacia Komitato por Etnaj

Liberecoj) petis profesoron Aloyzas Gudavičius, reĝisoro de IKU, informi nin pri la minoritataj popoloj de Litovio. La plej reprezentaj popoloj nelitovaj estas la polaj kaj la rusaj. La pola minoritato estas la plej grava en Litovio kaj tio facile kompreniĝas kaŭze de la longa komuna historio inter Litovio kaj Pollando. La rusa minoritato ĉefe ŝuldiĝas al la longa anekso de la tri baltaj landoj, kaj inter ili Litovio, fare de Sovetunio. Sed ekzistas aliaj minoritataj etnoj, kaj Litovio jam de kelkaj jaroj fariĝis bona ekzemplo pri traktado de siaj minoritatoj. Jam en 1989 ĝi akceptis leĝon pri naciaj minoritatoj kaj establis Departementon pri Naciaj Minoritatoj ĉe registaro¹. – Tiun jaron la kunveno de la strategia forumo estis kunigita kun tiu de la fakaj asocioj de UEA. Veras, ke la fakaj asocioj, kiuj uzas esperanton por politikaj, religiaj, filozofiaj, sciencaj, profesiaj kaj libertempaj celoj, povas doni bonan bildon pri la utilo de esperanto. La asocioj do informis pri sia maniero kontakti samideanojn ne esperantistajn. Ankaŭ la rilatoj inter UEA kaj la fakaj asocioj estis debatitaj, kaj montriĝis, ke necesus reorganizo de tiuj rilatoj ĉar estas granda diferenco inter ekzemple kat-amantoj kaj ISAE (Internacia Sciencasocio de Esperanto).

Distra programo

Kongresoj donas ankaŭ okazon distriĝi, kaj tion ni povis altkvalite fari. La Nacia Vespero estis vera antologio pri la folkloraj kostumoj de Litovio, la Internacia Vespero estis rimarkinde altnivela. Shelter Sceno el Serbio lerte kaj plenumure instruis

« Kiel mortigi sian edzinon ». Laŭ mi la temo estis malpli kontraŭfeminista ol oni povis antaŭvidi. TESPА, la fama teatra trupo el Tuluzo donis al si la malfacilan defion ludi la sukcesan teatraĵon « Familia etoso ». Domaĝe, ke ilia elparolo ne perfektis kaj fariĝis ofte nekomprenbla. Sed multajn aliajn okazojn la kongresanoj povis kapti por aŭskulti muzikon, spekti teatraĵon.

Feliĉe ke la merkreda tago lasis iom da tempo por viziti Vilnius, la

belan « Romon de la Nordo » kun siaj multaj barokaj preĝejoj.

Nicole Margot

¹ Pri la etna situacio de Litovio vi povas legi kompiladon de antaŭaj artikoloj en la lasta numero de « Etnismo », n-ro 76, p. 14, « Litovio kaj la du aliaj baltaj landoj tra la paĝoj de 'Etnismo' ». La prelego de profesoro Aloyzas Gudavičius aperos fine de tiu jaro en la venonta numero de « Etnismo ». Numeroj mendeblaj ĉe N. Margot.

Konkrete helpo al afrikaj landoj per esperanto

De 25 jaroj Hans Bakker senlace okupiĝas pri « Afrika agado » de UEA helpante afrikanojn lerni esperanton kaj plibonigi samtempe iliajn ŝancojn je digna vivo en malfacilaj cirkonstancoj. Je ĉi tiu 25-jara jubileo Gbeglo Koffi decidis eldoni libron titolitan « Dank' al Hans Bakker » kiel omaĝon de la afrikaj esperantistoj al la jubileulo.

Kiom valoras 482 eŭroj ?

Je la 23a de junio 2004 donaco de 482 eŭroj atingis s-ron Mulele S. Mbassa, esperantisto en Bunda, Tanzanio. Tio estis la fina respondo al lia peto investi en kudrejo, por ke li komencu havi proprajn enspezojn. Tiu peto tushis la korojn de s-ro Saionji Masayuki kaj s-ro Eskil Svane. Tiuj bonkoraj esperantistoj en Japanio kaj Francio kune disponigis la monsumon. S-ro Svane tion faris kiel membro de Rotaria Klubo de Pézenas. Fino de monkolektado, sed komenco de la laboro de Mulele S. Mbassa. Li tuj

aĉetis kudromaŝinojn kaj aliajn bezonaĵojn kaj diligente komencis la realigon de sia revo. Plurfoje li sendis financajn raportojn pri la bona evoluo, kaj nun je la 15a de julio 2005 li sendis leteron, kiu meritas diskonigon. Mi koncizigis ĝin.

Hans Bakker

Saluton !

Mi iam havis ideon fari artikolon kaj sendi ĝin al vi por Esperantorevuo. La artikolo temas pri la mizero kiu estas obstaklo al esperantistoj en evolulandoj trovi korespondamiki(in)on en riĉaj landoj. Tiuj supozas ke ili ricevos petojn doni monon. Mi pensas ke tio endanĝerigas la Esperanto-movadon en evolulandoj kaj konstruas klasojn inter la esperantistoj. Miaflanke mi tre dankas vin havigi al mi biciklon, kudromaŝinon kaj kapitalon por mia projekto. Senhezite mi anoncas ke la projekto estas jam

profitdona. Nun en la sezono de la rikoltado de kotono, mi multe vendas vestaĵojn. La projekto bone progresas kaj havas bonan farton. Ne nur mi profitas sed ankaŭ la Esperanto-klubo kaj aliaj suferantoj. Mi jam helpis ok personojn por zorgi pri sia familio. Al unu el ili mi donis monon por aĉeti unu sakon da brasiko. Li diligente komercis per tio kaj li multe dankis min. Tamen ne mi meritas tiujn dankojn, sed vi, bonkoraj amikoj kiuj estis la bazo de tiu helpo. Miaflanke la mono multe helpas min solvi miajn problemojn, faciligas la korespondadon kaj la kontribuadon al la komunumo ĉirkaŭ mi. Nun mi havas

planon konstrui dometon por mia familio ĉar ni ne havas dormejon en la dometo kie mi nun loĝas. Fine mi tre bedaŭras la forpason de prof. d-ro Jan Knappert. Mi konis tiun sinjoron per lia Esperanto-suahila vortaro, per kiu mi lernis la Esperanto-lingvon.

Plej amike,

Mulele S. Mbassa

Volonte ricevas reagojn al la adreso:
P.O. Box 25
Bunda, Mara, Tanzania
mulelembassa@yahoo.com



Fotis Claude Gacond

Richard Schneller, la redaktoro de niaj *Kulturaj paĝoj*, migranta en la valo Doubs kun Andrée Gacond.